






G.L. GINELLI

ITALIA

ferrovista

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti



25-a JUBILEA I.F.E.F.-KONGRESO EN AARHUS

KONGRESA REZOLUCIO

La 25-a Kongreso de la Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio "IFEF", kiun partoprenis 502 personoj el 18 landoj, kiu ĵus akceptis la JAPANAN ESPERANTISTAN LIGON FERVOJISTAN kiel 20-an landan asocion, kaj kiu speciale direktis sian atenton al la lingva haoso en la Eŭropa Komunumo, en internacia turismo kaj en ĉiuspeca trafiko,

Konstatas, ke turistaj kaj profesiaj pasaĝeroj de la fervojo, kiel grava amastrafikilo, same kiel la deĵorantaj fervojistoj mem, daŭre kaj ĉie spertas lingvajn barojn, kiuj malhelpas kontaktojn al enloĝantoj de aliaj landoj kaj bremsas la deziritan kaj necesan alproksimiĝon de la popoloj en Eŭropo kaj la tuta mondo,

atentigas, ke simultana tradukado ja povas esti utila en certaj okazoj, sed neniel helpas en translima trafiko,

opinias, ke pro tio la fervojaj kompanioj devus havi plej grandan interesecon, kiel eble plej komplete forigi tiajn lingvajn malfacilaĵojn,

proponas, ĝenerale adopti por la internacia trafiko la neŭtralan, internacian lingvon Esperanto, elprovita de jardekoj,

invitas, la fervojajn administraciojn kaj turismajn organizaĵojn, kunvoki internacian konferencon por esplori kaj solvi ĉi tiun lingvan problemon ne plu prokasteban.

Dum nia Jubilea Kongreso oni festis la veteranojn de nia movado. Tiuokaze nia kolego De Jong brile salutis la veteranojn per jena parolado, kiu skizis la historion de nia 25-jara Fervoĵista Esperanto-Movado.

Estimataj amikoj

Volonte mi akceptis inviton de IFEF-prezidanto, diri en ĉi tiu speciala kunveno de malnovaj amikoj, kelkajn laŭdajn vortojn al niaj veteranoj, esprimi dankon al fidelaj kunlaborantoj en la momento de la 25-jara ekzistado de nia Federacio.

Per via sindona laboro kaj fidela membreco vi konservis en bona stato la fundamenton de nia movado kaj en daŭra kunlaborado vi ornamis tiun fundamenton per la nun jam vaste konata, bela kaj fortika konstruaĵo, kiu estas nia INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO.

Vi scias ke la unuaj paŝoj por gajni la necesan simpatiecon de fervojaj instancoj, sindikatoj kaj aŭtoritatuloj ne estis facilaj, ĉar antaŭ dudek kvin jaroj la bona volo kaj la entuziasmaj klopodoj en niaj vicoj estis multe pli grandaj ol sperto kaj kapablo kaj ke manko de financaj rimedoj estis ofte sentebla.

Post ampleksa prepara laboro de niaj plej aktivaj aktivuloj I.F.E.F. fondiĝis la 4-an de Aŭgusto 1948-a. La unuajn iniciativojn por restarigo de internacia fervojista movado prenis francaj gastoj kaj nederlandaj gastigantoj dum boatveturo en Amsterdam, la 15-an de majo 1947-a.

Kiel partoprenintoj al tiu kunveno en ŝipkajuto la bildo en "KONGRESA HISTORIO" montras la francajn amikojn; Lemonnier, Polly Francois Lecoque Hervouet kaj la nederlandanojn Lok Hoen Biesheuvel Wissink. Kiel kunlaborintoj al la fonda kunveno la bildo sur sama paĝo montras en la unua vico Stapel, Lok, Thorsted; en la dua vico la francan amikon Godard, Olaf Ohlson (Svedio) kaj Keiser (Svislando). Mankas en tiu bildo Johannes Christoffersen kiu havis la kuraĝon, jam en tiu fonda kunveno inviti al la unua IFEF-kongreso por 1949-a en Aarhus.

Kiu el la partoprenintoj ne memorus pri tiu unua! Grandioze efikis la vere amika tutsemajna kunestado de kolegoj el 8 landoj kiuj sentis, post kruela milito, la profundan signifon de la vortoj de D-ro Zamenhof, en la unua kongreso de Esperanto:

"HODIAŬ KUNVENAS HOMOJ KUN HOMOJ."

Neforgesebla por la unuaj pioniroj de nia movado estas ankaŭ la konferenco en Vieno, kiu okazis unu monaton antaŭ la kongreso de Aarhus. Tie, en Vieno, entuziasma Jozeph Zink, en ĉeesto de granda aro da vianoj, kore akceptis malgrandan karavanon, konsistantan el jam nomitaj danaj kaj nederlandaj amikoj kaj la karmemoraj Retault el Francio, Quarone, kaj se mi bone memoras, ankaŭ Borione kaj Zacconi el Italio kaj Keiser el Svislando.

La dokumentoj de la konferenco, kun stampo de la aŭstria cenzuro, kaj subskribitaj de po unu reprezentanto de la ĉeestantaj landoj, troviĝas ankoraŭ en Aarhus.

Negranda estas la nombro de niaj veteranoj kiuj memoras tiujn unuajn klopodojn ĉirkaŭ la restarigo de fervojista esperanto-movado. Tro multaj aktivuloj el tiu unua periodo ne plu vivas. Sed sendube multaj el vi havas viglajn memorojn pri unu aŭ pluraj el la unuaj dek kongresoj kiuj multe helpis konatigi la movadon inter kolegoj kaj por vekti simpatian ĉe -por ni- gravaj instancoj.

Vera revelacio por la preskaŭ 150 partoprenantoj estis la unua, ĉi tie en Aarhus, pro la varma etoso kaj la amikaj rilatoj inter kolegoj el 8 landoj. Ili certe memoras la popularan altstaturan Anker Christensen kies morto pro fervoja labor-akcidento, du jarojn poste, konsternis liajn multajn amikojn.

En la ĉarma kongreso de Salzburg elektiĝis nova redaktoro por la komunikilo kiu, pro financaj kaŭzoj, ĝis tiam aperis malregule, en kvanto de nur kelkaj ekzempleroj. Kvar monatojn poste, la apero de "Bulteno" signifis grandan progreson en la komunikado inter funkciuloj kaj membroj reciproke. Pensu nur pri la ampleksaj raportoj de Jan Lok, la stimulaĵ artikoloj de prezidanto Stapel, la protokoloj de Drijfhout kaj la unuaj informoj pri terminara kaj faka laboro. La ofte plorindaj financaj raportoj de la kasisto Biesheuvel instigis al libervolaj donacoj por "Bulteno" kiu dank' al tio povis kontinui sian necertan ekziston. Malavare kontribuis por la gazeto, la svedoj sub gvido de Hjalmar Ohlson, kaj ankaŭ la Svisoj.

En la Pariza kongreso estis pli klare rimarkebla la starto de terminara kaj faka laboroj. S-ro Pape laŭdis siajn kunlaborantojn Hell, Lienhard, Blin kaj Simon, kiuj kun li apartenis al la unuaj kuraĝuloj kiuj akceptis kunlaboron en la giganta tasko, kiu estas la kompilado de fervojfaka vortaro. Tre gravan laboron tiurilate jam faris eminentuloj Rosher kaj Rebiček. Menciinda estas la bonega artikolo de Blin en la kongreslibro, pri la lokomotiv-pruvejo en Vitry kaj la ekskurso tien. Ombra flanko de tiu jaro estis la subita morto, en la kongresurbo, de estrarano Antoon Wissink, kaj la morto de Dirk Muller, unu monaton antaŭ la kongreso.

En Lindaŭ okazis la unua plena kunsido de la Terminara Komisiono, faka ekskurso al riparejo Friedrichshafen kun prelego tie. La ĉeesto en tiu kongreso de reprezentantoj de la Aŭstria, Francia, Germana, Norvegia kaj Svedia Fervojoj, montris jam kreskantan interesiĝon por nia laboro.

Okaze de la kvina kongreso, en Utrecht, IFEF surprizis siajn membrojn per 24-paĝa jubilea numero de "Bulteno", kiu, vestita en ĉarma verda kovrilo, fiere atestis pri nia 5-jara ekzisto. Karikatura desegno pri prezidanto Stapel kun grandega ligna martelo, la foto de Jan Lok, bildoj pri Ejjfelturo kaj Himmelsbjerget kaj sprita prezentaĵo de la terminara laboro rilatas al parto de la bonaj artikoloj. Surprizon alportis ankaŭ la delegito Joachim Giessner, kiu transdonis al la IFEF-estraro la unuan ekzempleron de la granda horaro en kiu la Germana Federacia Fervojo, kiel unua en la mondo presigis la liston de klarigoj ankaŭ en Esperanto.

La kvina kongreso, kaj poste multaj aliaj, substrekis ke nia laboro estis rigardata serioza afero. Envenis saluttelegramoj de la nederlanda ĉefministro, D-ro Drees, de la prezidant-direktoro de la Nederlandaj

Fervojoj S-ro Den Hollander, de S-ro Frans Jonas, tiam urbestro de Vieno, kaj de la nederlanda ministro de trafiko, S-ro Algra. Ankaŭ ĉi tie parolis en solena malfermo multaj reprezentantoj de fervojaj administracioj, sindikatoj kaj esperanto-organizaĵoj. En laborkunsido S-roj Mollion kaj Rummel - poste dum longa tempo valoraj amikoj de nia movado - salutparolis nome de respektive la franca kaj la germana socialaj fervojaj organizoj.

En Verona, kie aktivis la juna Gino Corso kaj Ceroni, Pape informis ke li devas definitive fini la laboron por la terminaro. Blondeaux kun helpo de francaj kaj germanaj amikoj daŭrigis. La Belgoj montris frazaron por vojaĝantoj, Esperanto-franca-nederlanda; la Danoj prezentis bele prizorgitan libreton, kun traduko en dana lingvo de la vortaro de Rosher.

En Zurich la "Bi-wa-so-no-kongreso" dorlotis la virinojn per tri, speciale por ili aranĝitaj, ekskursoj. (Bi-wa-so-no laŭ PIV signifas Bip, Walder, Sonderegger, Nol). Blondeaux surtabligis jam pretan, bonaspektan kajeron kun ĉirkaŭ 5000 fervojaj terminoj kaj esprimoj en Esperanto.

En Stokholmo la terminara laboro fine trovis novan gvidanton en la juna Ritterspach, kiu, kun helpo de la edzino dum pluraj jaroj gvidis kaj antaŭenpuŝis la laborojn.

Eble tiu tre ĝojiga fakto kaŭzis ke la bela kongreso en Rijeka staris en la signo de la "slivovic". En laborkunsido IFEF promesis ke "Bulteno" aperos presita, kiu promeso plenumiĝis jam en Aŭgusto.

Kaj post Rijeka denove al Aarhus por rigardi ĉu kontentige kreskis la porkidoj. En Aarhus decidoj por la urĝe necesaj plibonigoj de la fakaj prelegoj. La ekziĝo en tiu kongreso de la estraranoj Stapel, Biesheuvel kaj Drijfhout signifis gravan perdon de tri jam spertaj gvidantoj. Konso-lon alportis amiko Burger el Linz, kiu transdonis koverton kun 200 guldenoj por la bulteno. Memorinda el tiu kongreso estas ankaŭ la apero de Hungara Fervojista Mondo, kiu ĝis nun restis la perlo de niaj landaj organoj. Laŭdoj al D-ro Baeska kaj redaktoroj Simon Csora kaj Pal Kristek.

Jen, kelkaj memorindaj faktoj el la kongresoj de la dek unuaj jaroj, kiam nia membronombro kreskis de 250 ĝis preskaŭ 2000. Ili neniel donas kompletan bildon pri la aktivecoj de la movado, nek pri la amikoj kiuj plenumis la laboron. Krom la kongresoj okazis ja, en la kadro de nia movado, pluraj aranĝoj, kiel la feriaj semajnoj, organizitaj de bone konataj amikoj en Svisio kaj Nederlando kaj la precipe ĉe nia junularo fame konataj skisemajnoj, dum pli ol dek jaroj perfekte organizitaj kaj lerte gvidataj de Johan Geroldinger.

Multaj el niaj veteranoj laboris en landaj estraroj, estis membroj de komisionoj, de la IFEF-komitato aŭ instruis en vesperaj kursoj; aliaj helpis fortigi la fundamenton de la movado per sia fidela membreco kaj subteno. Estas absolute neeble nomi ĉiun aparte.

Memorigi faktojn estas ne tro riska afero, sed mencio de personoj kiuj intime rilatis tiujn faktojn, estas laŭ mia sperto vere danĝera, ĉar neniam kontentiga por ĉiuj aŭskultantoj. Sed se vi riproĉas al mi ke mi forgesis nomi tiun kaj tiun meritplenan kunlaborinton, mi respondas al vi ke mi ne forgesis, ke mi neniam forgesos la grandan nombron de karaj amikoj kiuj tro frue forlasis nin.

La vera historio de movado troviĝas ne en libreto sed en la memoro kaj en la koroj de ĝiaj adeptoj. Por ĉiu el vi tiu historio aspektas alia, multe pli varma, kun la bildoj de karaj kunlaborintoj, kaj amataj amikoj, kies voĉon ni neniam plu aŭdos.

Dank' al ilia laboro, dank' al via laboro kaj dank' al la laboremo de tiuj kiuj transprenis iliajn taskojn, IFEF fariĝis respektinda faktoro en la lukto kontraŭ lingvo-konfuziĝo. Kaj al vi, niaj veteranoj, kiuj, ĉiu en sia loko, helpis atingi tiun staton, mi esprimas sinceran dankon.

LA HISPANAJ KOLEGOJ ATENDAS NIN VENONTJARE EN TARRAGONA DE LA 10-a ĜIS LA 18-a DE MAJO. REZERVU VIAJN FERIOJN POR NIA 26-a I.F.E.F.- KONGRESO! VENU MULTNOMBRAJ AL TARRAGONA!

PERVOJISTOJ - ESPERANTISTOJ LA TRIAN FOJON EN AARHUS

Kvankam la internacia kongreso de la fervojistoj-esperantistoj okazis jam la 3-an fojon en Aarhus, la bela dana urbo konservis sian allogon: 502 kongresanoj el 18 landoj alfrontis la longan vojaĝon ĝis la orienta bordo de la Jutlanda duoninsulo, por partopreni la 25-an, jubilean kongreson. Ĉar Aarhus meritas viziton, belege situanta ĉe la marbordo, en proksimeco de arbaroj, ĝi estas la dua urbo de Danlando, kun 235 mil loĝantoj, kaj posedas la duan havenon laŭ grandeco, vizitatan ĉiujare de preskaŭ 10 mil ŝipoj. Vigla urbo, Aarhus posedas rimarkindajn kulturajn aktivecojn, interalie unu el la plej modernaj kaj bele situantaj Universitatoj. Inter la urbaj monumentoj, estas aparte interesaj la katedralo, kiu datumas de la 12-a jarcento, kaj la moderna urbodomo, kie konserviĝas plurjarcentaj dokumentoj.

Aarhus akceptis la kongresanojn, la 12-an de majo, per agrabla surprizo: en la alvenhalo de la stacidomo, la kongreso estis anoncata sur granda, bela transversa ŝildo en verda koloro, kaj esperanto-flagoj kune kun danaj flagoj troviĝis ĉe ambaŭ flankoj de la halo, en kies mezo la bele ornamitaj montrofenestroj de grandmagazeno "Salling" enhavis bonvenajn vortojn. La unua vido al la kongresejo (la hotelo "Merkur") estis 4 esperanto-flagoj, kiuj gaje flirtis en la printempa venteto. Krome, tri trolistrioj, transverse metitaj, atentigis la preterpasantojn pri la kongreso. Vidalvide, la montrofenestroj de la kongresa banko, prezentis ekspoziciajn tabulojn pri Esperanto.

La saman tagon, 12-an de majo, okazis la Interkona Vespero, la ĉiam ŝatata okazo retrovi malnovajn geamikojn kaj starigi novajn interligojn.

Dimanĉon la 13-an, estis ekumena Diservo en la preĝejo de Nia Sinjorino. Orkestro konsistanta el 7 blov-instrumentoj ludis mezepokan religian muzikon, sub la gvido de la juna esperantisto Lars Jørgensen. La protestanta paroĥestro Gunnar Edberg legis la komencajn vortojn el la Psalmaro, dum li legis la preĝon "Patro Nia" kune kun la katolika pastro Gottfried Grünewald. Ambaŭ celebrantoj legis partetojn de Biblio; la prediko, en flua esperanto, estis farita de la protestanta paroĥestro.

Tuj poste okazis la solena inaŭguro de la Kongreso, en la impona halo de la urbodomo. Meritas mencion, interalie, la salutvortoj de la urbestro de Aarhus, kaj tiuj, en Esperanto, de la neesperantistaj reprezentantoj de pluraj fervojaj instancoj. Ne mankis, kompreneble, la salutoj de la reprezentantoj de la esperantistaj asocioj, kaj de la reprezentantoj de la landaj-asocioj. Dum la paŭzoj, ludis muzikon orkestro kaj koruso.

Dum la kongresa bankedo, estis solene transdonita arĝenta medalo de "F.I.S.A.I.C.", al la dana veterano Johannes Christoffersen, fare de la Ĝeneralprezidanto de FISAIC mem, D-ro E. Schlessler.

Post urba rondveturado, multegaj kongresanoj ĉeestis la unuan fakprelegon, de D-ro Werner Bormann, elstara fakulo en la Universitato de Hamburgo, pri "Eŭropa fervoja politiko en la Komuna Merkato".

Dua gazetara konferenco (post tiu de la 11-a de majo, jam antaŭ la komenciĝo de la Kongreso) okazis en la ekumena centro de la Universitato; franca fervojistino kaj junulo el Kameruno, amiko Happy, respondis en Esperanto al diversaj demandoj. La streĉa dimanĉo finiĝis per humorplena kaj sukcesa balo.

Lundon la 14-an de majo okazis la komitat-kunsido; dum la publika parto oni anoncis, interalie, ke dum la Universala Kongreso en Beogrado, en la kadro de I.S.U., estos prelego pri fervoja temo, nome "Kontenera trafiko kaj terminaloj", fare de la jugoslava esperantisto kaj fervoja funkciulo Gvozden Sredić. Okazis ankaŭ kunvenoj de la terminara kaj fakprelega komisionoj kaj de la junulara sekcio.

Mardon la 15-an oni faris ekskurson al vagonfabriko "Scandia". La reprezentantoj de la firmao bonvenigis en esperanto kaj klarigis pri la laboro. Posttagmeze post la veterana kunveno, la urbaj aŭtoritatoj akceptis ĉiujn gekongresanojn en la urbodoma halo kaj regalis ilin per abundaj

manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ankaŭ estis vizito al la ĵurnalo "Yjllands Posten", kie oni povis ĉeesti la preparadon, presadon kaj distribuadon de moderna gazeto.

Merkredon la 16-an estis tuttaga ekskurso per ŝipo kaj trajno al la Jutlandaj lagoj kaj erikejoj; kelkaj komisionoj eĉ kunsidis dum la veturado.

Ĵaŭdon, okazis la tre multe vizitata plenkunsido kiu aprobis la kongresan rezolucion. Oni estis ankaŭ anoncitaj la sidejojn de la venontaj kongresoj de I.F.E.F. Kiel konate, venontjare la kongreso okazos en Tarragona, Hispanio; por 1975-a anonciĝis Aŭstrio kaj por la posta jaro oni esploros pri Svedio. Posttagmeze gaja piedpilkmaĉo inter D.S.B. kaj kongresanoj, kunvenigis, en la stadiono de Viby, multegajn bruemajn subtenantojn de nia teamo kiu tamen malvenkis 1 kontraŭ 4. Interesa folklora vespero pri Gronlando, gvidata de S-ano Jørgensen, konkludis la tagon. Interalie, ĉiu kongresano ricevis 40-paĝan esperantlingvan broŝuron pri Gronlando: temas pri la dua eldono de speciala numero de "Norda Prismo", pagita de la Dana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj. Ankaŭ estis je dispono de la kongresanoj la faldfolio "Danio en Bildoj", kun teksto en Esperanto, ricevebla ĉe Danaj Ambasadorejoj en diversaj landoj, kaj 24-paĝa kolora broŝuro pri Aarhus kaj ĉirkaŭaĵo, novredaktita en Esperanto en 5 mil ekzempleroj.

Vendrede okazis dua fakprelego pri "Danaj ŝtatfervojoj kiel ŝipkompanio". Dum la postaj tagoj, oni oficiale postkongresis en Kopenhago.

P I E D P I L K - M A Ĉ O

La piedpilkludo inter la D.S.B.-teamo (Danaj Ŝtataj Fervojoj sub aŭspicioj de FISAIC) kaj plurnacia teamo de la kongresanoj okazis ĵaŭde en la stadiono de Viby, ĉe la kongresejo.

La internacia teamo, kiu malvenkis 4 kontraŭ 1, konsistis el jenaj junaj kaj ne junaj kongresanoj, preskaŭ ĉiuj sen taŭgaj ŝuoj:

- | | |
|--------------------------------------|--------------|
| 1) Johano Geroldinger | - Aŭstrio |
| 2) Luis Guerra Gimenez | - Hispanio |
| 3) Jozefo Chuiton | - Francio |
| 4) Franco Tangianu | - Italio |
| 5) Jose Molina Garcia | - Hispanio |
| 6) Silvestre Ratero Oliver | - Hispanio |
| 7) Renzo Mantovan | - Italio |
| 8) Santiago Chamacho Leon | - Hispanio |
| 9) Hilaire Happy (Kameruno) | - Francio |
| 10) Jean Mevel | - Francio |
| 11) Werner Heimlich Jun. | - Germanio |
| <u>Rezervoj:</u> 12) Jovan Mirkovic' | - Jugoslavio |
| - Elio Donatiello | - Italio |
| - Enrico Perez Estevez | - Hispanio |
| - Gerard Horn | - Francio |

Ankaŭ s-ano Horace Barks (Anglio) proponis sin kiel rezervo.

Trejnisto: Carlos Virumbrales Carcedo - Hispanio

Kroniko: Kiam nia teamo malvenkis 3 kontraŭ nulo, la sperta trejnisto Carlos enmetis en la teamo Jovan. Tuj poste Renzo sukcesis meti en la danan reton la solan golon de nia, preskaŭ sensua teamo.

La entuziasmo de la spektantoj estis granda, precipe granda la bruego de la sudlandanoj inter kiuj la Hispanaj virinoj varme subtenis iliajn edzojn.

Resumo de la dua fakprelego "D.S.B. Kiel Ŝipkompanio"

La trafikkomuniko laŭ la novkonstruitaj fervojlinioj ĉirkaŭ en la jaro 1870 donis al D.S.B. eksterordinarajn problemojn pro la primitivaj cirkonstancoj ĉe la havenoj. Temporaba kaj multekosta transŝarĝo de varoj al privatposedantaj, tro malgrandaj ŝipoj, kun nesufiĉa kapacito kaj sen komforto por la grandiganta nombro da pasaĝeroj, necesigis novan iniciaton. Tio okazis en 1872, kiam DSB per la unua pramo komencis en la trafiko trans "Lillebaelt"=Malgranda Belto. Kun kapacito por 5 varvagonoj kaj modesta

loko por pasaĝeroj, la pramo "Lillebaelt" realigis la unuajn DSB-ŝipkompanian paŝojn, kaj faris tion kun sukceso. Alta nombro de transportitaj varvagonoj kaj pasaĝeroj, baldaŭ poste montris la neceson de pli multaj pramoj kaj novaj pramlinioj. Pri tiu evoluo la parlamento agnoskis la respondecon por pliigo de la fervojpramtrafiko kaj permesis monon por linio trans "Storebaelt"=Granda Belto, la plej signifoplena transiro en Danlando. Fariĝis eble transporti fervojveturilojn, ek de Jutlando kaj Fueno, rekte al Selando sen transŝarĝo, kaj la celo speciale estis utiligi la trafikon inter la landpartoj kaj Kopenhago. Tiu modernigo de la publika trafikkomuniko havis evoluigan efikon en la industrioj, kaj donis bonan komforton al la pasaĝeroj. La transportbezono fariĝis pli kaj pli sentebla kaj klare esprimis certan pruvon pri avantaĝoj kaj utilo de fervojpramtrafiko. Laŭ sama maniero anoncis sin antaŭ la internaciaj linioj de- kaj al Svedio kaj Germanio. DSB klopodis modernigi kaj pliiĝi la pramaron por havi sufiĉan kapaciton, sed la konstanta premo ĉie de la grandiganta fervojtrafiko bone helpita de la alveninta nova aŭto- trafiko donis anstataŭ aliajn pli grandajn transporttaskojn.

Tia estis la trafiksituacio, kiam la dua mondmilito subite haltigis la evoluon. Kun la samaj problemoj komenciĝis la postmilita periodo, sed kun tiu granda diferenco, ke la pramoj intertempe malnoviĝis kaj suferis pro troa uzado, kaj nova transportbezono grandigis kiel neniam antaŭe. Tiel rapide, kiel la parlamento donis monan permeson, venis novaj pramoj, sed por havi sufiĉan kapaciton ankaŭ por la ekfloranta aŭtomobilismo estis devige konstrui specialajn aŭtopramojn kaj kelkloke specialajn aŭtopramliniojn.

Per pramoj, kelkaj el la plej modernaj en Eŭropo, DSB servas kiel la plej granda ŝipkompanio en la dana martrafiko kun 34 pramoj.

Tie, kie DSB modeste komencis en 1872, nun estas 2 pontoj, kaj grandan intereson havas la demando: Kie ekestos unue nova ponto? Ĉu "Storebaelt"= Granda Belto aŭ ĉu Øresund inter Danlando kaj Svedio?

PACPLENA ESPERANTO+SEMAJNFINO MEZE DE LA BATAKAMPARO DE WATERLOO
=====

La Belga Esperanto Fervojista Asocio organizos sian jarkunsidon 1973 en la monaĥinejo de FIRCHEMONT situanta meze de la batakamparo de Waterloo.

Se vi ŝatas historiplenajn kaj agrablan longigitan semajnfinojn venu al Waterloo la 29-an kaj 30-an de septembro kaj vizitu kun ni la 1-an de oktobro i.a. la histori- kaj naturplenajn lokojn MARIMONT.

Krom la interesaj prelegoj, vizitoj al muzeoj kaj filmprezentadoj, ekspozicioj, Esperanto-ekzamenoj kaj diplomiĝoj, ĥorkantoj kaj muzikistaro fervojaj, vi certe ĝuos napoleonan etoson en kaj ekster la monaĥinejo.

Eblas pli longa restado. Programo kaj aliĝiloj akireblaj ĝis la 15-a de septembro ĉe: BELGA ESPERANTO FERVOJISTA ASOCIO, Stacio B-1030 ETTERBEEK
RADIO-ROMA-ESPERANTO-Casella Postale 320 I-00100 ROMA (Italujo)

Redaktoro: D-ro Antonio DE SALVO, Via Olbia, 15 I-00182 ROMA. Kunlaboras: D-ino Vera di TOCCO kaj f-ino Mirella MERLANI.

La elsendoj okazas ĉiudimanĉe, de la 21-a horo ĝis la 21-a kaj 20 minutoj (mezeŭropa tempo) sur ondlongoj: metroj 30,90 41,24 25,42
kilohercoj 9,710 7.275 11.800

La unua parto de la elsendo estas dediĉita al "Novaĵoj el Italujo" (kaj de tempo al tempo al "Leterkesto"); la dua parto al "Kuriero de E.".

Kun plezuro kaj dankemo ni akceptas kontribuojn de niaj aŭskultantoj (informojn, dokumentan materialon, rimarkojn kaj sugestojn pri la aŭdebleco kaj la enhavo de la elsendoj). La redakcioj de la Esperanto-gazetoj estas afable petataj konsideri la eblecon havigi al ni ekzempleron de siaj eldonaĵoj, kiujn ni utiligos por niaj elsendoj menciante la fonton.

Ni dankas pro via letero/karto/presaĵo de kiu ni menciis dum nia elsendo de p. LA REDAKCIO DE RADIO ROMA-ESPERANTO (D-ro Antonio De Salvo)